72

Biblioteko

# NOVA KULTURO



P. Danov

## Fariseo kaj impostisto

II-a jaro № 8

La lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis

Burgas-Bulgarujo

Biblioteko „NOVA KULTURO“

Petro Danov

# Fariseo kaj Impostisto

8

Burgas — Bulgarujo
1931

# Fariseo kaj impostisto

Du homoj supreniris en la templon por preĝi; unu estis fariseo kaj la alia — impostisto.

Luko, 18:10

Certe vi demandos: kio estas mirinda, ke du homoj: fariseo kaj impostisto, eniris en la templon! Efektive, tio ne estas mirinda por tiuj, kiuj komprenas la aferojn, sed por tiuj, kiuj ilin ne komprenas, ĉio estas mirinda. Por tiuj, kiuj bone komprenas la aferojn, ĉio havas sencon kaj por tiuj, kiuj ne komprenas, ĉio estas sensenca.

Tiuj du homoj: fariseo kaj impostisto, estas objekto de mia hodiaŭa prelego. Tiuj du personoj estas gravaj reprezentantoj de tre malnova kulturo. Ni komparu iliajn karakterajn trajtojn, por ke vi komprenu iliajn vivon kaj spiritan karakteron.

La vorto „fariseo" devenas de la hebrea vorto „paraŝ", kiu signifas „dividi". Ekzistas ankaŭ araba vorto „farsi", kiu devenas de la sama radiko kaj signifas ion bonan laŭ formo; paroli „farsi" iun lingvon, tio signifas paroli ĝin perfekte kaj bonege. Kristo prezentas en tiu ĉi ĉapitro du karakterajn tipojn. Iu genia pentristo, kiu konas bone la sciencon pri la homo, pentrus tiujn du homojn kun ĉiuj iliaj karakteraj trajtoj kaj tiu ĉi bonega pentraĵo meritus esti en ĉiu domo, kiel modelo. Kiaj estas la distingaj trajtoj de la fariseo kaj tiuj de la impostisto? Ne sufiĉas, ke oni diru: tiu estas fariseo kaj tiu — impostisto, sed oni devas koni la eksterajn signojn de iliaj vizaĝoj, de iliaj manoj, de ilia staturo, oni devas koni la formon de iliaj kapoj. Post tio ni devas esplori la specifan flankon de ilia animo. Nur tiamaniere ni povos klarigi al ni la ideon de la citita

pli supre verso kaj ĝin profiti. Kristo estis granda pentristo; Li elmontris du distingajn trajtojn de tiuj du karakteroj kaj laŭ ili mi priskribos la fariseon kaj la impostiston. Vi diros: „Kiel vi povos priskribi homon, nur laŭ kelkaj vortoj diritaj pri li?“ Tio estas scienco. Oni povas fari tion. Estas sciencistoj, kiuj longtempe okupis sin per la kompara anatomio; ili ellernis la organismojn de la bestoj tiel bone, ke se vi donos al ili la plej malgrandan parton de iu ajn besto vivinta antaŭ la diluvio, ili priskribos al vi ĝian strukturon, kunmetos ĉiujn ĝiajn ostojn, muskolojn kaj tendenojn kaj tiamaniere restarigos la malaperintan formon. Se vi donos al iu sperta natursciencisto nur unu folion de iu ajn kreskaĵo, li kapablos priskribi al vi la tutan kreskaĵon. Laŭ la sama leĝo mi penos priskribi al vi la fariseon kaj la impostiston. Vi diros al mi: „Kio komuna estas inter tiuj du homoj, kiuj vivis antaŭ du mil jaroj?“ — En la mondo estas du specoj de homoj — impostistoj kaj fariseoj; de ili devenis multaj aliaj, tamen ili estas fundamentaj tipoj. Vi apartenas al la unua aŭ al la alia tipo — negrave ĉu vi estas pastro, noblulo, sciencisto, filozofo, viro aŭ virino. Tiuj du karakteroj interplektiĝas kaj elmontriĝas en ĉies vivo. Ili estos por ĉiam la distingaj tipoj en la homa historio. La arto de Kristo konsistas nome el tio, ke Li kapablis priskribi kaj prezenti ilin tiel klare per tre malmulte da vortoj.

La ekstera aspekto de la fariseo estas deca. Li estas homo korpulenta, belstatura, altkreska, pli alta ol la ordinara homo. Liaj manoj kaj fingroj estas longaj, la dika fingro estas longa, simetria — signo de firma vivkoncepto, firma volo kaj de inteligenteco; la montra kaj la ringa fingroj egalaj — tio signifas, ke se en li aperos iu ajn ideo, li ĝin aplikos, profitante la lastajn eblecojn por ĝia apliko. Lia digestado estas korekta, en manĝado kaj trinkado li estas sindetenema: li ne estas frandemulo kaj drinkemulo; lia gusto estas bona. Lia lumbo ne estas tiel dika. Li jam pasigis la kvar periodojn de sia vivo kaj komencis la kvinan t. e. li estas 45-jara. Liaj ŝultroj estas iom ovalaj, la vizaĝo iom longfor-

ma kaj pirforma, kun bona nerva sistemo. La malsupra makzelo estas bone formita kun longa kaj pikforma mentono — signo de homo kun vigla kaj perceptema menso; la buŝo estas ordinara, la lipoj — nek tre dikaj, nek tre maldikaj; la randoj de la buŝo iom levitaj; sur ili estas ĉiam rideto de malestimo — „la homoj estas amaso", sed neniam li elmontras ekstere sian malestimon. La okuloj estas grizkoloraj; la brovoj — arkformaj, iom kliniĝintaj, kiel la branĉo de maljuna arbo — homo, kiu vivis longe kaj kiu havas sperton de la vivo. Lia frunto estas bela, alta, en sia malsupra parto super la nazo iom konveksa — signo de homo, forte individueca, kun observema kaj praktika menso. La tempioj mezevoluintaj; oreloj korektformaj kaj premitaj al la kapo — signo de materia ordo. La barbo estas iom maldensa kaj ruĝeta — signo de impulso kaj obstino. Lia kapo estas sferforma, ĝia ĉirkaŭo apud la oreloj estas 56 — 60 cm. kun forte konveksa verto — signo de homo kun granda sinregado, memestimo, fiereco, postulemo kaj vanteco. Religian senton li posedas, sed ĝi estas parte evoluinta, li praktikas la mizerikordon, sed nur al si mem kaj al siaj proksimuloj. Lia vizaĝo estas pale-blanka kun nazo de greka-roma tipo. Li estas homo kun estetika gusto, sed sen poezio kaj amo al la naturo, al la supero kaj al la idealoj. Li estas homo kun forta fido, sed fido nur en sia menso; kun granda espero, sed nur en sia forto. Li havas religion, sed en tiu ĉi religio li estimas, adoras nur sin mem. Kiam ni eniros lian templon, ni vidos sur unua loko anstataŭ la bildo de Jesuo Kristo, lian propran portreton kaj anstataŭ la bildoj de la sanktuloj — la portretojn de liaj avoj kaj praavoj, al kiuj li incensas kaj preĝas — „glora, granda estas nia gento". Li estas homo inteligenta, kiu bone instruas sin en la vivo, konanta bone la hebrean kabalon kaj la principojn de la tiama civilizacio kaj se li vivus en nia tempo, li estus traktata kiel fama verkisto, filozofo, pentristo, ŝtatisto kaj eklezia ĉefo.

Kial Kristo pritraktas tiun ĉi tipon? Kio malbona estas en lia preĝo? La filozofio de la fariseo

jam travivis sian tempon. La fariseo estas homo, kiu vivas nur kun la pasinteco kaj ne atentas la estontecon kaj la estantecon, homo, kiu enamiĝis kiel fraŭlino aŭ fraŭlo, en sia propra portreto kaj kie ajn li iras, nur ĝin li vidas. Strange estas, kiam oni enamiĝas en sia propra bildo. Vi vidas, kiel interesaj estas la vortoj de la fariseo, kiam li turnas sin al Dio: „Ho Dio, mi dankas al vi, ke mi ne estas kiel la ceteraj homoj". Sed lia filozofio nome tie ĉi ne estas prava, ĉar Dio kreis ĉiujn homojn. „Mi ne estas kiel la ceteraj homoj", sed ja kia vi estas? Vi tute ne estas anĝelo, el la sama kaĉo vi estas farita, ankaŭ en viaj vejnoj cirkulas la sama sango. Li volas trompi sin, ankaŭ Dion. Jen la unua mensogo, kiun li uzis. Kaj Dio diras al li: „Vi ne parolas la veron". La aserto de la fariseo estas negativa; li ne komparas sin kun la pli superaj ol si, kun la anĝeloj, sed kun la pli malsuperaj tipoj, kun la krimuloj, tiel ke li ne estas kiel ili. Por momento ni supozu, ke mi komparas min kun la bestoj, dirante: „Mi dankas al Vi, Dio, ke mi ne estas kiel la bestoj". Ĉu tia komparo havas sencon? Tio estas erarkompreno, kiu troviĝas en ĉiuj homoj. Antaŭ kelkaj jaroj en Bulgarujo inter la gejunuloj kaj gestudentoj ekzistis certa movado, ke ili pristudu la vivon de la famaj verkistoj, ekz. tiun de Shakspeare kaj ke ili alproprigu al si la malbonajn flankojn de iliaj karakteroj, ĉar al tiuj gejunuloj mankis iliaj pozitivaj kapabloj kaj karakteraj trajtoj. Kaj kiam ili trovis en si tiujn negativajn trajtojn, ili fiere proklamis: „Ankaŭ mi kiel Shakspeare estas genia." Ili pristudis la karakteron de Schiller kaj serĉis iujn el liaj ekscentraj trajtoj kaj trovinte tiujn samajn trajtojn en si, ili jam komencis proklami sin geniaj kiel Schiller. Ili pristudis multajn verkistojn kaj famajn homojn kaj poste parolis, ke ili jam estas geniaj, famaj homoj. Jes, ili estas famaj, sed en negativa senco, famaj homoj, kies kapitalo estas kun signo „minus". Mi preferas homon, kiu havas nenian kapitalon, ĉar oni nek ŝuldas al li, nek li ŝuldas al iu ajn. Ankaŭ la fariseo diras: „Mi dankas al Vi, Dio, ke mi ne estas

rabisto kiel la impostisto." Sed, se Dio metus lin je la loko de la impostisto, kion li farus? Iam iu anĝelo observante de la ĉielo iun homon, kiu multe pekis, demandis Dion, kiel Li toleras lin. La anĝelo diris al Dio, ke se li estus je Lia loko, li tuj purigus la teron, forigante ĉiujn malbonajn homojn. Dio sendis la anĝelon sur la teron, li reenkarniĝis kaj Dio metis lin en la saman staton kaj la anĝelo faris duoble pli multe da pekoj ol la homo, kiun li prijuĝis tiom severe. Do, oni ne devas juĝi la homojn pri iliaj agoj de malproksime, ĉar je ilia loko ankaŭ ili tion saman faros. Multaj venis ĉe mi, dirante, ke ili ne estas tiel malbonaj, ke ili estas bone edukitaj kaj ke devenas de famaj familioj. Mi ne dubas en iliaj paroloj, profunde en mia animo mi kredas tion, kion ili parolas; ni ĉiuj devenas de famaj familioj, sed viaj kaj miaj geavoj kaj praavoj ne estis tiel noblaj, kiel mi kaj vi opinias ilin. Multaj el ili estis netaŭguloj, krimuloj, malbonfarantoj, vagabondoj; sekve, kion Dio notis pri ili, tion nun mi kaj vi portos. Eble la ekstera aspekto de la aferoj estas bona, sed ilia enhavo ne estas tia. Ke niaj avoj kaj praavoj ne estis tiel puraj, kiel ni opinias, tion pruvas la malbonaj trajtoj, kiujn ni heredis kaj kiujn minimume dufoje en tago ni aperigas. Se viaj geavoj kaj gepatroj estis tiel puraj kaj bonaj, kiel la anĝeloj, de kie devenas tiuj malbonaj trajtoj en ni kaj tiuj malbonoj en la vivo? Se vi metos iom da maldolĉeco aŭ veneno en iun ajn fluidaĵon, oni tion tuj konstatos; oni ekkonos, ke en la bonon estas metita io malbona.

Do, homojn kun la filozofio de la fariseo ni povas nomi konservuloj, homoj, kiuj havas tre favoran opinion pri si mem. Ne estas malbone, ke oni havu favoran opinion pri si mem, nur ĝi estu prava kaj ne entenu ian ajn maldolĉecon. Plej granda konservulo kaj regulilo en la naturo estas la azoto, kiu ĉesigas ĉiun ajn brulon, sufokas. ĉian vivon. La azoto estas la plej malnova, la plej ekvilibrigita elemento en la naturo; sed se en la naturo estus

nur ĝi, ĉio mortus. Malgraŭ tio la organisma vivo ŝuldas multon al ĝi.

La fariseo ne petas helpon de Dio por korekti sian karakteron — tute ne. Li nur dankas, ke li ne estas kiel le ceteraj homoj: mallaŭdemaj, rabemaj, mortigantoj, adultemaj. Nome, kiel skribisto kaj filozofo, li devis esplori la kaŭzojn de la mallaŭdemo, de la rabemo, de la mortigoj kaj de la adultemo. Kiam ni renkontas iujn homojn, kiuj estas pli malsuperaj ol ni, laŭ la Instruo de Kristo, ni ne devas ilin kondamni en nia animo, sed ni devas trovi la kaŭzojn, kiuj ilin faligis tiel malsupren kaj se en ni troviĝas iuj el ili, ni ilin forigu. Ĉar Tiu, Kiu starigis la grandan Leĝon de la vivo, diras: „Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj." En tiuj vortoj estas profunda senco kaj, kiu ilin komprenis, atingis la superan leĝon de la homa bonstato. La nuntempaj zoologistoj pristudas la bestojn kaj donas al la mondo multajn valorajn aferojn, sed neniu ankoraŭ pristudis la profundajn kaŭzojn, kiuj ilin kreas. Ekz. kial iuj el ili havas kornojn kaj aliaj ne havas, kial iuj el ili treniĝas kaj aliaj marŝas kvarpiede; kial iuj el ili manĝas viandon kaj aliaj paŝtiĝas je herbo kaj plej poste kial ili estas senigitaj de la homa inteligenteco. Por tio estas profundaj kaŭzoj, tio tute ne estas arbitra, kiel eble iuj povas supozi. Kiam oni komprenos tiujn profundajn kaŭzojn, ili akiros la racian filozofion, sur kiu baziĝos la estonta sociordo — la aŭroro de la nova civilizacio. La tuta nuntempa civilizacio baziĝas sur la vidpunkto de la fariseo — ĝi estas farisea civilizacio. Tiu civilizacio, en kiu la homoj distingiĝas laŭ formo, ekstero, naskiĝis en la antikveco en Egiptujo, Hindujo, Babilonio, Ĥinujo, Persujo, Judujo, Grekujo, en la roma imperio. Hodiaŭ ĝi estas ankaŭ en Eŭropo, vestita per la belega kristana mantelo. Mi ne diras, ke ĝi en siaj fundamentoj estas malbona, sed mi diras, ke la formo devas posedi ĉiam certan enhavon. Sen la enhavo, la formo fariĝas simpla ŝelo, en kiu povas loĝi nur parazitoj.

Kiam la fariseo preĝis, Kristo observis lin kaj

diris al li: „Via animo estas malserena, viaj prapatroj ne vivis tiel puran vivon, kiel vi imagas. Vi opinias, ke vi ne estas kiel la ceteraj homoj, sed en la pasinteco vi estis kiel ili, ja, ankaŭ nun vi ne superas ilian nivelon. Kiel ajn ni klarigu tiun fakton, ĉu laŭ la instruo de la hindaj filozofoj pri la reenkarniĝo aŭ laŭ la instruo de la Egiptaj saĝuloj pri la transmigro aŭ laŭ la instruo de la kabalistoj aŭ okultistoj pri la elfluo kaj la perfektiĝo de la spirito aŭ laŭ la nuntempa filozofia instruo pri la heredebleco tio estas tute egala. Tiuj ĉi instruoj kaj teorioj estas nur helpiloj por ni, por ke ni klarigu per ili certajn faktojn pli bone, por ke la fenomenoj de la homa vivo fariĝu pli klaraj kaj pli facile kompreneblaj. Tamen la fundamenta principo, estanta en la bazo de ĉiuj aferoj, restas ĉiam unu kaj sama, negrave kiamaniere ni klarigas kaj komprenas ĝiajn elmontrojn. La leĝo de kaŭzoj kaj postsekvoj, de agoj kaj venĝoj neniam trompas, ĝi ĉiam parolas la absolutan veron. Se vi estas bona, ĝi skribas en la libron de la vivo, ke vi estas bona; se vi estas malbona, ĝi notas, ke vi estas malbona. Se vi parolas la veron, ĝi enskribas en la libron de la vivo, ke vi parolas la veron; se vi mensogas, ĝi notas tion; se vi helpas al viaj proksimuloj, se vi memoferas vin por via nacio, se vi laboras por la bono de la homaro, se vi servas al Dio pro amo, ĝi notas tion en la libro de la vivo; se vi perfortas viajn proksimulojn, perfidas vian popolon, haltigas la evoluon de la homaro, perfidas Dion — ĝi notas tion en la libro. Ĝi senindulge faras siajn notojn pri la agoj de la homoj sur la frunto, sur la nazo, sur la buŝo, sur la vizaĝo, sur la kapo, sur la manoj, sur la fingroj kaj sur ĉiuj ceteraj membroj de la homa korpo — ĉiu osto atestas por aŭ kontraŭ vi. Kaj tiun historion pri la homa vivo ni legas ĉiutage. En ĝiaj paĝoj estas priskribita la vivo de ĉiuj niaj prapatroj: pri iuj el ili estas skribite, ke ili estis kruelaj krimuloj, ŝtelistoj kaj banditoj. Foliumante ĝin kaj pristudante la vojon, laŭ kiu venis Abraham, Isaak, Jakob, David, Salomono kaj multaj aliaj, ni trovas

en tiu historio iliajn agojn ĝuste priskribitajn. Ni konstatas, ke Abraham estis homo justa, tre klera, homo kun bona koro, kun forta fido, kun supera Spirito, konanta la profundan saĝecon de la Diaj aranĝoj por la majesta estonteco de la homaro. Ni konstatas, ke Jakob unue estis homo duoblepersona, ruza, egoisto, kiu per mensogo kaj trompo sukcesis alproprigi al si la unuenaskitecon de sia frato kaj apenaŭ ĉirkaŭ sia tridektria jaro li ŝanĝiĝis, post kiam li servis al sia onklo Laban 14 jarojn por liaj du filinoj: tiam nome li komencis fari bonon. Pri David ni scias, ke li estis homo kuraĝa, brava, kun perfekta natura poeta menso, sed li havis neordinaran inklinon al la belaj virinoj. Per trompo li prenis la edzinon de Urija, depost tiam komencis liaj elprovoj. Kaj la kuraĝa profeto Natan ne timis kaj malkaŝe riproĉis lin kaj montris al li la malbonajn postsekvojn de lia ago por la estonta generacio. Pri Salomono estas skribite, ke li havis perfektan filozofian menson, kun bona, sed malvirta koro, kun tre fortaj sentoj kaj pasioj, kun granda vanteco kaj malforta volo; li estis unuagrada sibaristo kaj ŝatis amuziĝi kun belaj virinoj. Kristo scias tion. Li scias kiel vivis ankaŭ lia gento kaj kiam oni diris al li: „Majstro bona“, Li kontraŭdiris: „Kial vi nomas Min bona? — Bona estas nur Dio“. Per tio Li volis diri, ke la familio, de kiu Li devenis, ne estis tiel nobla, kiel oni opiniis. Ĉar Dio alimaniere mezuras, tiel, kiel vi tute ne supozas. Li postulas absolutan purecon ĉiurilatan. Multaj membroj de tiu familio ne vivis tiel, kiel volis la vera Dio, Kies Volon Kristo plenumis. Tiel Li turnas sin al la fariseo kaj diras al li: „Vi trompas vin mem, la homojn kaj Dion: multaj el viaj prapatroj krimis kaj tial vi ne rajtas diri, ke vi ne estas kiel la ceteraj. En via animo ne estas humileco, tial via preĝo ne povas esti akceptata kaj vi ne povas esti pardonata. Vi, la fariseoj aliigis la Dian Leĝon, metinte la hipokritecon kiel kovrilon. Ne prezentu vin plu tiaj, kiaj vi ne estas, ĉar Dio ne estas homo, kiu povas esti trompata per via ekstera aspekto: Li rigardas vian koron kaj laŭ ĝi Li vin pritaksas“.

Nun mi pritraktos la alian tipon — la impostiston. Li estas homo mezstatura, diketa, liaj piedoj estas mallongaj, la manoj — dikaj, la fingroj — ankaŭ diketaj kaj pikformaj, la vizaĝo — rondforma; lia stomaksistemo funkcias bonege — li ŝatas manĝi kaj trinki. „Antaŭ mi staras longa vojo, mi devas havi nutraĵon“ — tiel li saĝumadas kaj tial li iĝas impostisto; de ie li petos, de alie li forŝtelos iom, ĝis kiam li plenigos sian sakon. Mi diris al vi, ke la impostisto havas vizaĝon rondforman, dikajn brovojn, lia mentono malsupre estas larĝa — kion li entreprenas, sukcese li ĝin finas. Lia aĝo estas 40—45 jaroj. La barbo estas kun nigraj taŭzaj haroj, la lipharoj — samaj, signo de forta varmeco; lia nazo estas forte evoluinta, mallonga, dika, kun larĝaj naztruoj — signo de bona spirsistemo; li estas homo sentema, impulsema, kiel infano li ĉiam povas eldiri sian ĝojon; drinkinte duonan kilogramon da vino, li povas salti pro ĝojo; sobriĝinte, li komencas plori, ĉar lia edzino estas malsana. La tempioj estas iom konveksaj, la oreloj grandetaj, preskaŭ kiel tiuj de Tolstoj, kiel homo kiu ŝtelas, forprenas, sed ankaŭ donas — „la gepatroj ŝteladis, nun mi donos, mi bonfaros, por ke Dio pardonu niajn pekojn“. Liaj okuloj estas brunkoloraj aŭ vinkoloraj — signo de natura moleco kaj bonanimeco, kiuj atendas nur sian tempon por elmontri sin. Lia kapo estas korekte formita, kiel la kapo de Sokrato. Li havas perfekte evoluintajn familiajn kaj sociajn sentojn, fortan religian senton, senton de mizerikordo, korektan komprenon pri la vivo, perfektan menson, senigitan de sofismo, forte evoluintan konsciencon, montranta al li la erarojn kaj li ne hontas ilin konfesi antaŭ Dio, antaŭ la homoj kaj antaŭ si mem. Li ne estas kun emfazaj vivkonceptoj pri sia nobleco. Li havas religion, sed li enmetis la bildon de la bona Dio, sed ne la sian. Li ĉiam fidas, ke Tiu Bona Dio kondukos lin al la lumo. Li pli multe fidas Dion, ol sin mem. Li havas korektan filozofion: li ne komparas sin kun la malpli altgradaj ŝtelistoj kaj vagabondoj, sed diras: „Dio, kiam mi rigardas Vin, la anĝelojn,

la sanktulojn, mi hontas pri mi mem; mi devas supreniĝi, mi devas fariĝi kiel Vi. Mi estas pekulo, miaj avoj kaj praavoj kaj mi ne fariĝis bonaj homoj; mi manĝas, trinkas, mi fariĝis kiel porko; pardonu min, ke mi ne profitas la bonaĵojn, kiujn Vi donas al mi". Kaj kion diras Kristo? Tiu homo, kiu konfesas siajn erarojn, havas suprenigan idealon, iam li superos la fariseon. La riĉulo fidas nur siajn rentojn kaj riĉaĵojn, nenion li laboras kaj okupas sin nur pri politiko, pri la socia vivo. Aliaj homoj leviĝas matene frue, laboras 10 horojn tage, malsukcesas, sed ili persistas kaj plej poste post multaj jaroj akiras sciojn kaj fariĝas famaj.

Nun inter vi, pardonu min, — estas homoj de la du tipoj. Sed ĉar Kristo elmontras la du kontraŭajn polusojn, mi diras al vi, prenu la bonon de la unua kaj la bonon de la dua kaj kreu la noblan farisean kaj impostistan karakteron. Kreu la trian tipon de la kristano, de la nova homo. Vi diras: „Ĉu tia pekulo, ĉu fariseo mi estas? Vi ofendas min." Mi diros al vi la jenan veron: Kiam vin trafas iu malfeliĉo, vi komencas plendi: „Kial, ho Dio, vi destinas tian malfeliĉon por mi? Estas aliaj pli grandaj pekuloj ol mi". Tiam ĉu vi ne estas en la stato de la fariseo? Ĉu vi ne estas homo, kiu diskutas kun Dio? Dio diras al vi: „Vi estas tre justa, sed ĉu vi scias kiom da abomenaĵoj faris viaj praavoj kaj prapatroj, kun kiuj vi iam estis kune kaj kunlaboris?" Vi iam kulpigis la fariseojn, sed ĉu vi scias, ke vi estas la nuntempaj fariseoj? Edifu vin je la karaktero de la fariseo, ke vi ne havu liajn malbonajn trajtojn, aŭ se vi ilin havas, elradikigu ilin, ne iru la vojon de la negativa vivo. Kion havis viaj geavoj, gepatroj tio ne estas grava, neniel tio vin utilos. Vi scias la fabelon pri la anseroj, kiujn iu kondukis al la urbo. La anseroj renkontis iun vojaĝanton kaj plendis al li, ke ilia mastro kondukas ilin kiel bestaron, kvazaŭ li ne scias, ke iliaj praavoj iam liberigis Romon. Sed tiu vojaĝanto ilin demandis, kion ili faris. „Nenion ni faris", respondis la

anseroj. — „Tiam vi meritas esti buĉataj". Viaj avo, patro, estis tiel superaj, noblaj homoj, sed kio vi estas? Se vi ne havas noblan karakteron, akiru ĝin. Eble viaj avo, patro donis al vi certan kapitalon, sed vi ĝin perdis.

Estas ankaŭ religiaj fariseoj: „Mi estas de la ortodoksa eklezio, mi estas de la evangelia, de la katolika eklezio, mi estas liberpensulo". Mi ĝojas, ke vi estas ortodoksano, ke vi estas evangelisto, katoliko, ke vi estas liberpensulo, sed ĉu vi havas la noblan karakteron de Jesuo? Se vi ĝin ne posedas, vi estas nek kristano, nek evangelisto, nenia vi estas. Akiru tiun karakteron por ke vi fariĝu tia. Iu diras, ke li estas liberpensulo. Ĉu li posedas la noblajn trajtojn de la liberpensuloj? Sub la vorto „liberpensulo" mi komprenas homon, kiu estas amiko de la Vero. Se vi ne estas tia, vi estas perfekta mensogulo. Ofte oni diras: „Vi estas bonega homo". La homoj de la nuntempa socio kunvenas kaj komencas laŭdi sin per nobleco, per honorsignoj. — „Ni legis vian verkon kaj ni admiras vian talenton". Kiam la verkisto foriris, la aliaj komencis paroli pri li, ke li estas granda malsaĝulo. Kiam la dua foriris, la ceteraj komencis paroli la samon ankaŭ pri li. Kaj tio ripetiĝas ĝis kiam plej poste restas nur unu kaj li kompreneble nenion malbonan diros pri si mem. Ne trompu vin per tio, kion oni parolas pri vi, ĉar la homoj povas diri diversajn malagrablajn aferojn. Neniu parolas la veron. Tiuj, kiuj riproĉas vin, kvazaŭ parolas pli multe la veron, ol tiuj, kiuj vin laŭdas. Iu diras: „Vi estas nobla". Certe, vi estas bona, sed ne tiom, ne pensu, ke vi estas bonega. Iam vi marŝas, svingas vian bastonon, kvazaŭ vi solvis iun grandan taskon de Arhimedo; vi opinias, ke kiel vi alia homo ne estas. Se vi estas impostisto, vi diros, ke vi regas la mondon. Kristo diras: „Antaŭ multaj jaroj viaj avoj kaj praavoj regis kaj mi memoras, ke en mia libro estas skribite, ke ili krimis; eble vi ankaŭ ekiros tiun saman vojon, ne memfidu!" Tial, en kia ajn stato ni trovu nin, ni devas havi kiel idealon nur Dion. En tiu ĉi mondo ni renkontos multe da mal-

agrablaj aferoj. Eble ni renkontos amikon, kiu amas nin kaj diros al ni ion veran; mi ne volas, ke vi suspektu ĉiujn, sed se 100 homoj vin laŭdas, inter ili nur tri personoj povas diri la veron, la ceteraj povas diri la veron aŭ tre maldelikate aŭ tre flateme. La vero ne troviĝas en la ekstremoj. Oni devas akiri la bonajn trajtojn de la fariseo, lian bonegan menson, vivkoncepton kaj ordon, kaj de la impostisto — la mizerikordon, la profundan piecon, la internan konscion konfesi siajn erarojn kaj lian deziron korekti sian vivon. Tiuj impostisto kaj fariseo troviĝas ankaŭ en la familio — la edzo estas fariseo, la edzino — impostisto. La edzo estas riĉa, belstatura, bela, nobla homo kaj la edzino devenas de simpla familio, ŝia patro kaj avo estis malkleraj homoj; li ekrigardas ŝin kaj diras: „Ĉu vi scias de kie mi vin eltiris?“, kaj ŝi tuj konfuziĝas. Aliloke la edzino estas fariseo kaj la edzo — impostisto. Ankaŭ en tiu familio ripetiĝas la samaj scenoj. Nun la fariseo kaj la impostisto devas korekti sian vivon. Kristo dirinte ke la impostisto estas senkulpigita, per tio li volis akcenti, ke ankaŭ la impostisto ne estis tiom prava, sed ke en liaj pensoj pri la vivo, pri la Dia ordo, estas pli da veraj konceptoj ol en la fariseo. Li volis diri, ke iun tagon la impostisto superos la fariseon. Se vi ne volas humiligi vin, Dio vin humiligos, ĉar Li humiligas la fierulojn kaj la humilajn Li suprenigas. La fiereco kaj la humileco estas sinonimoj al tiuj du homoj — la fariseo kaj la impostisto. Vi ne scias, kio okazos pri vi estonte ĉiuj viaj noblaj trajtoj kaj ĉiuj viaj avoj kaj praavoj ne povas vin savi. Antaŭ multaj jaroj ŝajne en Londono, iu el la plej riĉaj kaj eminentaj angloj enirис siajn trezorejojn kaj hazarde fermis la pordon post si, lasinte la ŝlosilon ekstere. Post kiam li observis sian tutan riĉaĵon, li volis eliri, sed sin trovis enŝlosita. Li tie sidis tagon, du, tri, ĉirkaŭ li estis amasoj da oro, grandaj riĉaĵoj, sed li ne povis eliri, nek povis sciigi, kie li troviĝas. Plej poste li mortis pro malsato, lasinte la jenan noteton: „Se iu povus doni al mi peceton da pano, mi estus preta donaci al li

la duonon de mia riĉaĵo". Se iam iel okazos, ke vi estu enfermitaj kiel tiu riĉulo, en la subteraj trezorejoj de viaj noblaj kaj famaj praavoj, peco da pano povas savi vin. Tial Kristo diras: „La pano povas savi vin, sed ne tiu pano, pri kiu vi batalas." Kaj ĉu vi scias, ke multe da homoj mortas tiel fermitaj en si? Homoj malesperiĝintaj, memmortigas sin. Ne memmortigas sin la impostistoj, sed ĉiam fariseoj. Poetoj, pentristoj kaj ŝtatistoj diras, ke la mondo ne povas pritaksi ilin, iliajn verkojn kaj pentraĵojn kaj ili sin mortigas. Ĝenerale tiuj fariseoj, tiuj noblaj pensuloj kun korektaj vizaĵoj kaj ruĝetaj barboj sin memmortigas. La fariseoj en Bulgarujo ne estas kun ruĝaj barboj; mi parolas al vi pri la hebreaj fariseoj, ilin mi priskribas. Niajn fariseojn mi priskribos alimaniere. Ankaŭ la bulgaraj fariseoj similas al la hebreaj, sed per io ili distingiĝas. Sed ĉar mia prelego ne estas pri la bulgaraj, sed pri la hebreaj fariseoj, tiam do konkludu pri la bulgaraj kaj serĉu tiujn tipojn. La celo de mia prelego estas, ke vi apliku ĉion praktike en via vivo.

La nuntempuloj predikas, ke se la homo volas sukcesi, li devas havi volon. Laŭ tri manieroj elmontras sin la volo; ĝi povas esti: 1) Arbitra; 2) volo havanta antaŭvide nur siajn interesojn, nur la interesojn de sia popolo kaj 3) volo, havanta antaŭvide la interesojn de la tuta socio, tiujn de la homo kaj de Dio. Volo, kiu ampleksas ĉiujn devojn, kiujn ni havas al la mondo kaj kies posedanton nenia forto povus malhelpi, ke li plenumu sian devon — estas volo bona. Volo, instiganta nin labori por la gloro de Dio kaj de la homaro, por nia popolo, familio kaj por la perfektiĝo de nia karaktero — estas vera volo. Iuj diras: „Vi devas havi noblan menson". Menso, kiu bone komprenas sian rilaton al Dio, menso, kiu okupas sin per la apliko de la superaj pensoj en la vivo — estas nobla menso. Vi posedas ĉiujn kondiĉojn necesajn por tio. „Sed mia nazo ne estas tia, kia mi ĝin volas". Ĝi fariĝos tia. Observu malgrandajn birdetojn en la nesto, kiuj ankoraŭ ne

havas plumojn, kiel ili atendas sian patrinon kaj kiam ŝi aperas, ili malfermas siajn beketojn. Kaj jen la patrino enŝovas en iliajn buŝetojn vermeton. Kaj multfoje dum la tago tio ripetiĝas. Al ili komencas kreski flugiloj kaj plej poste ili forflugas. Laŭ la sama leĝo ankaŭ vi devas agi, malfermadi vian buŝon, ankaŭ vi devas preĝi. Se vi ne preĝas, vi estas fariseo kaj Kristo diros al vi: „La mondo ne estas por vi, la Dia Regno ne estas por vi, la estonteco ne estas por vi". Tion volas diri Kristo. Estas homoj, kiuj ne ŝatas malfermi siajn buŝojn, ili nur silentas. Mi komprenas, ke oni devas silenti, sed kiam? — Kiam vi estas kolera, kiam vi volas ofendi iun, kiam vi envias, vi nepre devas silenti, sed kiam vi estas gaja, kiam vi devas konsoli iun, tiam malfermu vian buŝon kaj parolu. Ĉu vi parolas, kiam vi edukas la infanojn? Vi edukas viajn infanojn kiel la fariseoj; ili ne tuŝu la telerojn, por ke iliaj manoj ne malpuriĝu. Kial Kristo diras: „Ve al vi skribistoj kaj fariseoj"? En niaj familioj, en la eklezioj, ĉie ni elmontras tiujn trajtojn de la fariseoj kaj ni miras, kial ne venas la Dia Regno. Kaj ĉion superŝutas riproĉoj: „Malbona mondo, malbona socio, la pastroj, la instruistoj estas malbonaj, la regantoj estas ankaŭ malbonaj", kaj ni? — Ni estas kvazaŭ sanktuloj! Ankaŭ ni estas tiaj, kiel tiuj, kiujn ni riproĉas. Forlasu tiujn aferojn, ĉar via patrino estas ĉe vi; malfermu kiel la birdetoj vian buŝon kaj jen, vi akiros nutraĵon. Tio certe ŝajnos al vi ridinda, sed ĝi estas granda vero. Tio estas bagatelaĵo, sed ni devas profiti la ekzemplon por nia spertiĝo. Nun vi estas en la templo; Kristo demandas vin: „Kiel vi preĝas, ĉu kiel tiu-ĉi fariseo aŭ kiel la impostisto?" Kristo volas, ke ni ne estu kiel la fariseoj. Se estas io en la mondo, kio maltrankviligas ĉiujn, tio estas la fariseoj. Unue ni devas purigi nin kaj poste ni purigos la ceterajn. Unue ni devas eduki nin kaj poste — la ceterajn. Se mi komencos prediki ion, kion mi mem ne provis, mi erarigos la mondon. **Kiam vi komencos prediki, vi devas eldiri la superan Veron per vortoj kaj per via vivo.** Kiam

ni komencos instrui, ni devas labori samtempe per vortoj kaj per nia vivo. Al mi tre plaĉas tiuj instruistoj, kiuj instruante fizikon aŭ ĥemion tuj komencas fari eksperimentojn. Kiam la instruisto eniros en la ĉarpentejon, li devas instrui teorion kaj praktikon. Kiam li eniros en la kudrejon — la samon li devas fari. Kristo diras al la kristanoj: „Eniru kaj prenu vian mezurilon kaj vian tondilon". Iuj devas komenci per kudrilo kaj poste per tondilo. Kio estas la tondilo? La tondilo estas via lango. Kiam vi komencas tajlori kaj kudri per via lango, pli bona tondilo ol ĝi ne ekzistas. Kiam vi komencas tranĉi dekstren kaj maldekstren ne pripensante ĉion, tiam via tondilo ne laboras bone. Oni devas paroli tiel, kiel devas. Ĉar se vi parolas tion, kion vi ne devas paroli, se vi tranĉas ne pripensante ĉion — vi difektos la ŝtofon.

Mi ne parolas tion por senesperigi vin. Mi ne volas diri, ke vi estas naskitaj fariseoj, sed — ke vi havas la inklinojn de la fariseo. Vi ĉiuj havas ilin. Kaj ĝis certa grado tio estas bona. Sed kiam vi komencas paroli: „Dio, mi dankas al Vi, ke mi ne estas kiel la ceteraj", la fariseo jam konkeris vin kaj malfacile vi povos liberigi vin de li, li okupas la nukon, la verton, la orelojn, la kapon, la nazon, la internan parton de la okuloj. Ĉie vi trovos tiun fariseon. En ĉiuj viaj trajtoj kaj elmontroj li estas.

Do, Kristo nin nun demandas: „Kiu estas la plej bona maniero, laŭ kiu ni povas direkti nian preĝon al Dio?" Li komprenas la preĝon en la vasta senco de la vorto, preĝo por la bono de la socia vivo. Iuj opinias, ke oni povas preĝi sincere nur en preĝejoj. Vi devas trovi, kie troviĝas tiu preĝejo. La instruisto instruas la lernantojn pri certaj elementoj kaj poste instigas ilin, ke ili mem solaj solvu la taskojn, ke ili mem trovu la rilatojn de certa leĝo. Ie en la Epistoloj estas skribite: „Vi estas templo de Dio". Se ni estas temploj de Dio, kiam ni volas eniri en la sekretan ĉambreton antaŭ Dio, kiamaniere ni devas fari tion? Se ni eniros kiel la fariseo, Kristo

diros al ni: „Vi ne atingis vian celon". Se ni eniros kiel la impostisto kaj konfesos niajn pekojn kaj erarojn kaj promesos, ke ni ilin korektos, ni sukcesos kaj aŭdos la respondon de Kristo: „Vi estas pardonita". Eble la instruisto trovos en la kajero de la lernanto multajn erarojn. Li povas makuli vian tutan kajeron, li povas forstreki kelkajn vortojn, la lernanto certe koleriĝos. Se vi volas perfektiĝi, vi devas danki al la instruisto, ke li montris al vi viajn erarojn, ĉar alimaniere la eraroj povas plimultiĝi. Korektu, ne lasu ilin ne korektitaj. Sufiĉas nur unu eraro por malhonorigi la homon. Sufiĉas laŭ la sama leĝo nur unu virto por suprenigi vin en la ĉielon, por meti vin inter la anĝeloj. Kreu favorajn kondiĉojn kaj se iu via ago estas malbona, ĝi malsuprenigos vin, se ĝi estas bona, ĝi vin suprenigos. Sekve, atentu la virton kaj la eraron. Se al iu homo, kiu havis malvirtan vivon restis nur unu virto, ĝi estas la ŝnureto, ĵetita en la furiozantan maron de la vivo, kiu, se li kaptos ĝin, povas eltiri lin el la maro. Sekve, la lasta eraro, kiu povas resti en vi, estas tre danĝera, ĝi povas pereigi la homon, kiel la lasta virto estas tre forta kaj povas savi la homon. Ili povas ŝanĝi nian vivon. Tio estas leĝo. Tial Kristo diras: „Ne estu malatentaj." En la fariseo estis pli multe da noblaj trajtoj, ol en la impostisto, li superis treege la impostiston, sed li havis unu solan eraron — la fierecon, kiu sukcesis lin pereigi kaj faligi lin en la inferon. La impostisto estis pli granda pekulo, sed al li restis la lasta virto — la humileco kaj li diris: „Mi laboros por mia saviĝo" kaj Dio benis lian bonan deziron, ĉar li esperis ke estonte li korektos sin. Tiun-ĉi matenon mi demandas vin: Kie vi estas — ĉu en la lasta eraro aŭ en la lasta virto? Se vi estas en la lasta eraro, mi vin bedaŭras: gardu vin, vi estas en danĝera loko en via vivo. Se vi estas en via lasta virto, vi povas esti trankvila kaj mi konsideras vin feliĉa; vi estas sur firma roko, tenu tiun lastan virto kaj Kristo akompanos vin.

Prelego farita de la Majstro ja la
5. Oktobro 1914. en Sofio

Emilia Vilumson.

# La printempaj sonoj.

La printempaj ventoj blovas
En la koro milde sonas,
Pri la lumo, pri la suno,
Suferantaj homoj sonĝas.

Pereiĝos densaj nuboj,
Ekbriletos sunradioj,
Kaj ekfloros belaj floroj,
Ekĝojiĝos lacaj koroj.

Pacienco! Pacienco!
Ne atendu longan tempon,
Ĝis la lumo ĉion venkos,
En la koro bonon vekos!

Ĝojojn, kantojn, mildajn vortojn,
Portas tagoj bald' estontaj!
Amon, veron, saĝon, forton,
Portas fratoj lum' venontaj!

Pacienco! Pacienco!
Ne atendu longan tempon,
Vivos homoj kiel fratoj,
Helpos kor' en ĉiuj statoj!

Riga, 1. III. 1931.

Ljubomir Lulĉev

## El la fabeloj de Salomon-Ra.

Kial do, ho Reĝo, vi ne parolas al ni pri la grandaj misteroj de la vivo? Jen ni venis al vi el ĉiuj partoj de la mondo. Niaj animoj soifas kaj niaj lipoj estas sekaj, kiel tiuj de homoj longe marŝintaj tra la dezerto.

— Jes, reĝo, kiel la lipoj de homoj longe marŝintaj tra la dezerto, aldiris la ceteraj, kvazaŭ eĥo.

La saĝulo-reĝo alrigardis ilin kaj aldonis: „Mi konas vian ardan deziron, ĉar sen ĝi vi ne estus ĉi-tie, sed mi konas ankaŭ . . .“

Ĉu vi estas malkontenta pri io? — demandis lin are kelkaj personoj.

Li ekridetis. — Ja, kia saĝulo mi estus, se min povus malkontentigi tio aŭ alio?

— Tute vere, kapjesis ĉiuj.

Antaŭ longa tempo, jaroj jam pasis de tiam, mi estis juna kaj ĉion mi sciis . . . Sed ĉiu forpasinta tago elradikigis iun haron el mia kapo, iun memoraĵon ĝi forportis kun si kaj . . . iun nerealigitan revon . . .

En tiu tempo oni donacis al mi kolombon — paceman kaj belan.

Per elektitaj grajnoj mi ĝin nutris — el miaj manoj ĝi manĝis. Kaj mi karesis ĝin kaj flustris al ĝi mildajn vortojn, kiajn al neniu mi estis dirinta — al neniu homo, ĉar neniu estis tiel pura kiel ĝi!

Ĉiopova kaj potenca mi estis por ĉiuj, sed ne ankaŭ por ĝi. Ĝi venadis libere, sidiĝis sur mian ŝultron kaj ĝoje etendante la kolon prenadis nutraĵon el mia buŝo mem.

Mi tro multe amis kaj karesis ĝin . . .

Eksilentis la reĝo, klininte la kapon. Eksilentis ĉiuj. Kion li volis diri?

Senbrue kaj malrapide pasis la tempo.

La reĝo denove komencis.

Se mi etendis mian manon ĝi tuj venadis. Se

mi levis la kapon — per flugiloj ĝi ĉirkaŭprenis min; se mi flustris al ĝi ion — ĝi kveris al mi, kvazaŭ komprenis ĉiun mian vorton . . .

— Kia feliĉo por ĝi, scii viajn sekretojn, ho reĝo!

Jes, ĝi sciis pli multe ol iu ajn.

Kaj unu fojon, kiam la kurtenoj de la pordoj estis levitaj kaj sur la blua ĉielo flugis aro da kolomboj — ĝi forflugis . . . kaj neniam plu revenis. . .

— Sendankulo — laŭte ekkriis iu.

Pasis jaroj, mallaŭte daŭrigis la reĝo, multaj jaroj kaj multaj kolomboj alrigardis kaj ankaŭ alrigardas al mi.

Li eksilentis. Silentis ĉiuj. Radio de la subiranta suno, penetrinta en la ĉambron, ornamis la altan frunton de la reĝo dum kelkaj minutoj kaj poste malaperis.

— — — — — — — — —

Vanteco de la vantecoj.

Ĉion forlasis la reĝo kaj dum tuta nokto kuris for de siaj palacoj, for de siaj admirindaj salonoj, belegaj virinoj kaj adorantoj.

Ĝis la fundo la reĝo-saĝulo fortrinkis la maldolĉan pokalon: iun tagon hazarde li eksciis, ke lia amata edzino ne amas lin, ke lia amiko envias kaj subfosas lian tronon, ke la pli multaj disĉiploj de la saĝeco lernas kaj aŭskultas, sed ke tio ne penetras iliajn korojn, ne plialtigas iliajn animojn.

Kaj la admirinda templo, kiun li konstruis al Dio, ekŝajnis al li kvazaŭ sakrilegio, ĉar hazarde malferminte la Sanktan Skribon, li trovis la verson: „Kiu vi estas, kiu konstruos al mi templon? Ĉu la tero ne estas piedestalo de miaj piedoj kaj la ĉielo apogilo de miaj manoj?“

Liaj okuloj malfermiĝis — kvazaŭ la jarcentoj de la estonteco pasis preter li! Kaj li vidis la sensencon de ĉiuj homaj celadoj kaj la kreskon de ĉiuj agoj; el la semoj elkreskis potencaj arboj, la eraretoj fariĝis krimoj, la krimoj fariĝis malbenoj de la aparta homo, de la gento, de la tuta homaro . . .

Kaj li vidis sian vivon disverŝitan en miloj da

tagoj kaj siajn tagojn kaj farojn en la vivo de miloj da homoj.

Kaj estis al li terure malgaje kaj kuris la reĝo dum la tuta nokto, vestita en simplaj vestoj, forlasinta ĉion.

Simile al lasta vaganto sur la tero, soleca kaj forlasita, vagadis li tra la arbaroj, dezertoj, suriradis montetojn kaj malsupreniradis en iliajn piedojn por serĉi akvon. Noktaj birdoj kantis super lia kapo kaj sovaĝaj bestoj blekegis en la malproksimo.

Vantaĵo, ĉio estas vanta — meditis la reĝo, sidante sub larĝobranĉa olivarbo — Vanteco de la vantecoj.

Kaj la nokto forpasis. Delikata roso gluiĝis al liaj haroj. Profunde meditanta, li vidis nenîon, aŭdis nenion. Kaj la nokto malrapide forpasis. En oriento leviĝis rozaj kurtenoj kaj la suno aperis.

Nevole la reĝo levis la kapon. Kaj en lia animo io ekvibris, ŝajne malnova amiko ekflustris al li karesajn vortojn . . .

Ekaŭskultis li kaj stariĝis. Malproksime de li aŭdiĝis bruo kaj plaŭdo de flugiloj . . . kaj kverado kaj ekkaresis lin flugiloj de kolombo, kiu lin iam forlasis kaj ĝi dorlotis lin per sia kapo.

La perdita kolombo!

Kun larmoj en okuloj ĝin rigardis la reĝo-saĝulo. — Ho, ne estas ĉio vanteco en la mondo! Estas la Amo, kiu plenigas ĉion kaj kiu donas sencon al ĉio — sen ĝi ĉio estas vanteco de la vantecoj.

La venintaj multnombraj servistoj maltrankvilaj trovis la reĝon kun kolombo sur la manoj, kvieta kaj potenca, kvankam liaj vestoj estis disŝiritaj kaj la haroj sur lia kapo estis en malordo.

Granda Reĝo, gastino al vi venas. Rapidirantaj heroldoj venis. La Granda Reĝino de Ŝeba.

Oni akceptu ŝin, diris la reĝo, kaj jen la alia gasto — la perdita kolombo—kaj montris ĝin al la reĝo.

Ĉu vi instruos nin ree? — demandis lin la soifantaj disĉiploj, kiuj sekvis liajn okulojn.

Li nur ekrigardis ilin, sed en liaj okuloj estis tiom da Amo, el ĝi ŝprucis tia ĝojo, ke neniu eĉ pensis, ke estas necesa alia respondo.

Tradukis: Jord. Nedelĉeva.

# Karaj legantoj,

Jen ni prezentas al vi la 8. numeron de la Biblioteko. Baldaŭ ni sendos al vi la 9 — 10. numerojn kaj la aldonon „La tri fundamentoj de la vivo" kaj la dua serio estos jam eldonita.

Elkore ni dankas al tiuj el vi, kiuj helpis nian laboron paginte sian abonkotizon kaj plej ĝentile petas la ceterajn postsekvi ilian ekzemplon, donante al ni tiamaniere la eblecon daŭrigi nian laboron — la eldonon de tria serio, kiun certe en la lasta numero de la Biblioteko ni anoncos.

Por rekompenci niajn legantojn, kiuj pagis kaj tiuj kiuj pagos sian abonkotizon ni starigis specialan fakon por fizionomiaj analizoj laŭ portreto por diveno de la karaktero.

Multaj jam sendis siajn portretojn kaj deklaris sin kontentaj pri la ricevitaj analizoj.

Detalajn sciigojn pri tiuj analizoj ni sendis al vi en la 4 — 5. numeroj de la Biblioteko. Se vi volas scii ion pri vi mem, pri via karaktero kaj kapabloj, pri la karaktero de viaj proksimuloj, pri iliaj inklinoj, bonvolu sendi vian aŭ ilian portreton kaj vi ricevos la konvenan analizon.

Ĉion bonvolu sendi al adreso: **Atanas Nikolov**, poŝtkesto № 6, Burgas, Bulgarnjo.

Petu senkostan specimenon de la gazeto

**„INTERNI"**

Ĝi volas kunlaborigi anojn de ĉiuj nacioj, religioj kaj klasoj por universala ekrego de libera kaj frateca bonvolo kaj de la Ora Regulo.

Direktoro: J. Jenkins, 64 St. Thomas Road, Finsbury Park, London № 4, Anglujo.

Redaktanto: Theodor W. Teich, Wilhelm-Straterstr. 43, Gladbach-Rheydt, Germanujo.

Bulgara abonejo: A. Nikolov, postkesto, 6 Burgas

La nova adreso de „Oomoto Internacia" estas: 1, rue Félix-Faure, Paris 15-e.

# BIBLIOGRAFIO

**Raportoj de la Aerologia Observatorio de Tateno** — Japanujo. En tiuj raportoj estas publikigitaj la rezultoj de la observadoj de la supra vento per pilotbalono, faritaj en la Aerologia Observatorio de Tateno.

La raportoj estas ampleksaj kaj estas verkitaj ekskluzive en Esperanto. Adreso: Aerologia Observatorio, Tateno apud Tutiura, (Ibaraki-ken) — Japanujo.

**Internacionalstenografio** — sistemo de stenografio internacia por ĉiuj lingvoj. La ideo pri tutmonda stenografio fariĝas pli reala depost kiam la ŝanco je baldaŭa enkonduko de internacia lingvo, nome de Esperanto, ekzistas.

Eldonejo: Instituto de Internacionalstenografio, Duisburg, Friedenstrasse 79, Germanujo.

**Oomoto,** monata organo de Oomoto-movado. Ĝoje ni konstatas, ke la parenca al ni movado rapide kreskas kaj ke Oomoto-revuo fariĝas pli kaj pli ampleksa kaj riĉenhava. Krom la specialaj artikoloj ĝi entenas gravajn novaĵojn el Japanujo, specifajn kutimojn japanajn. En la komenco de ĉiu libreto estas belaj bildoj. En la aprila numero ni legas pri la filmigo de la romano „Marta“ de Eliza Orzeszko. La romano delonge aperis en Esperanto.

Adreso: Oomoto Propaganda Oficejo, Kameoka, Kioto Fu, Japanujo.

**La Unuigita Tuthomaro,** organo de la homarpartio. La nomo de la revuo mem aludas pri la ideoj celataj. Adreso: Hamburg 24, Lubeckerstr, 27.

**Upoznaj sebe,** revuo por antropozofio. Redaktata en serba lingvo kaj entenanta interesajn artikolojn.

Adreso: Beograd, Poŝtanski pretinac 528.

**La vie universelle,** buletin trimestrial de l' Association International Biocosmique. Principo: La Universala kaj Eterna vivo. Celo: Forigo de ĉiuj kaŭzoj por milito, elmontrante la biokosmajn ligojn, kiuj faras la homojn fratoj en la granda tuthomara familio, unuigas ilin kaj faras ilin solidaraj kun la nova mondo; anstataŭigo de la lukto por la subteno de la vivo per la konkordo kaj la kunlaborado; anstataŭigo laŭ la vojo de la evoluo t. e. sen perforto, de la religioj, kiuj dividas la homojn, anstataŭ ilin unuigi. Adreso; Ass. Int. Biocosmique, Secretaire J. Estour, á Sollies — Pont (Var) Francujo.